## ĈEFA ARTIKOLO

Kaj nun...pro la demokratia kaj socia enprofundigo de la eŭropa unueco.

La "eŭro" estas jam reala ekde la 1-a de januaro 1999. La 11 eŭropeaj landoj kiuj integras la "eŭro"-n, povos subteni siajn proprajn naciajn monerojn ĝis la jaro 2002. Kun la komenco de tiu proceso, cele al la mona unueco, la landoj kiuj estas la Eŭropa Unio grave antaŭeniras, kaj tio efektivigas spacon kaj eŭropan politikon kiuj aldonas plenan liberon por la movado de varoj, kapitaloj kaj homoj.

El tiu ekonomia unueco kaj la progresa politika antaŭeniro, elmergiĝas ekonomika grava bloko de monda atingo, kies firmigo devos transformiĝi en realecon, -kaj ne nur planado- kun propra sendependeco en ekonomia politiko, internacieco kaj propra defendo.

En tiu analiza ĉefa artikolo, ni ne povas eniri pri la teknika kaj ekonomia reago pro la starigo de la "eŭro", ĉar al tiu laboro sin dediĉas kaj dediĉos fakuloj pri tiu temo, sed oni devas elstarigi ke pretekstante la validiĝo de la "eŭro", oni emfazos pri makroekonomikaj aferoj tiel en eŭropaj kiel en internaciaj ĉirkaŭaĵoj, kaj ke tiu inklino kaj debato kreskiĝos en socialaj grupoj (malaltaj aĉetpovaj civitanoj) kiuj, ĝis tiu ĉi momento, estis marĝene de similaj aferoj. Oni devas reliefigi la gravecon de tiu civitana partopreno favore al la enkadrigo de la politikajn kaj socialajn defiojn ankoraŭ nesolvitaj por akiri veran demokratan kaj socian Eŭropo-n.

En la nuna ekstera formo de la Eŭropa Unio ekzistas progresa rezigno de ĉiuj ŝtato-membroj al sia suvereneco pere de interŝtataj interkonsentoj. Traktadoj kaj estraraj normoj donas plenajn rajtojn al kelkaj institucioj -kiel la Eŭropa Centra Banko, kiu decidigas la ekonomikan kaj monan politikojn, kunekzistante kun la Eŭropa Parlamento, kiu ne atingis la agnoskon esti samvalorigita al la statuso de siaj samtempulaj naciaj parlamentoj, translokante al la Eŭropa Konsilantaro (kunmetita de Ŝtatoj kaj Registaraj Ĉefoj de la Ŝtatoj-membroj) la centro de la debato, propono kaj rezolucio de la esencaj temoj, kun la superregado de la interesoj de ĉiu Ŝtato kaj la spezblokado devigata de la malakordantoj. Pro tio, mankas komuna sociala politiko, ĉar ĉiu Stato ĝuas de ampleksa marĝeno por starigi tiujn diritajn politikojn, kaj pro tio daŭrigas la parolado pri demokrata kaj sociala "deficito" de la nuna modelo de la eŭropa unueco.

Kiel CENTRO DE STUDOJ KAJ DEBATOJ ni opìnias, ke ni devas kontribui al la medito pri la nuna stato de la Eŭropa Unio, alportante sugestojn por necesa debato kiu helpos superi la demokratiajn kaj sociajn "deficitojn" jam diritajn kaj eviti ilian longan daŭrecon. Pro tio, ni eldiras:

a)Kiaj ekonomiaj kaj sociaj transformiĝoj oni bezonas por ebligi ekonomian subtenan pligrandigon kaj la aserto de justa disdono de bonfarto efike kontraŭstarante situacioj de senlaboreco kaj bezonoj de socialaj atentoj postulitaj
de eŭropaj civitanoj?

b)Regularo de proceso por eŭropa politika konstruado, redifinante kaj potencante siajn instituciojn kiel la Eŭropan Komisionon, Eŭropan Parlamenton, ktp. ktp., defininte samtempe eŭropan federalan projekton.

c)La neceso esti konsciaj kiel eŭropaj civitanoj, sen fali en novan egoisman ŝovinismo, prenante sur ni mem la neceso de proceso cele de la integrado de novaj landoj ĝis la konstruado de reala Eŭropo. Ĉio, kune kun la deziro alporti al ni mem komunan politikon meze de internacia spaco, pere de aŭtonoma decido, por aktive partopreni en la solvo de ekzistantaj malfacilaĵoj kaj kun nia devigo en la kreado de nova ekonomika ordo, kiu reekvilibros la rilatoj inter la Nordo kaj la Sudo kaj ebligos la ekonomian startigon de landoj submetitaj al la grandaj ekonomikaj fortoj, ekstera ŝuldo kaj armilara kurado.

d)Disvastigi la konsciencon por efektivigi la kreadon kaj fortigi la organizaciojn kaj strukturojn de eŭropa spaco, kiel la Eŭropa Konfederacio de Sindikatoj, Asocioj kaj NROj kaj, speciale, la kreado de aŭtentika Eŭropa Socialista Partio, kun ekonomika projekto kaj komuna strategio, kiu preterpasos naciaj ŝovinismoj kaj proponante tutmondiĝa elektebleco de politika kaj socia transformiĝo.

e)Hodiaŭ estas ebla alfronti tiun taskon, por la preskaŭ plena ĉeesto de Socialistaj Partioj en la unua vico de la Ŝtataj-registaroj, kiuj konformas la Eŭropa Unio. Eŭropo -por sia konstruado- bezonas novan impulson kun demokrata kaj socia sinteno, kaj tio estas la speciala defio por socialistoj kaj demokratoj.

f)Fortikigi kaj disvastigi la malsimilajn eŭropajn kulturojn kaj disvolvi la komunajn iniciatojn kiel komunikiloj, kino, arto, historio... Kaj starigi debaton inter ĉiuj civitanoj pri la avantaĝoj kaj taŭgeco havigi eŭropan komunan lingvon -ĉu Esperanto--, kies lernado estu deviga en ĉiu lando -apud kaj kune kun la lingvo aŭ lingvoj propaj de la Ŝtato- de komuna uzado, en proksima limotempo, ene de la eŭropaj institucioj.

La Estraro de CEDESC

(tradukita de: KULTURA ASOCIO-ESPERANTISTA

ASSOCIACIO CULTURAL ESPERANTISTA




***Desde la Revista ESCRITS felicitem als municipis de Catalunya que tenen present a l'Esperanto:***

Barcelona
Castellbisbal
Cervera
Figueres
Girona
Les Fonts de Terrassa
Lleida
Manlleu
Manresa
Moià
Molins de Rei
Monistrol de Montserrat
Olot
Premià de Mar
Riells del Fai
Ripollet
Rubí
SABADELL (en majúsules perquè té el primer carrer del món dedicat a l'Esperanto desde el 14-07-1912)
Salou
Sant Cugat del Vallés
Sant Feliu de Codines
Sant Feliu de Guixols
Sant Pau d'Ordal
Sentmenat
Tarragona
Terrassa
Vilafranca del Penedès
Vilanova i la Geltrú
Vilarodona